

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.

Heinrich Heine,
En Majo

tradukita de Manfredo Ratislavo

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia koro estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

Heinrich Heine,
En la mirida bela Maj’

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burĝonoj fendis,
en mia koro la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)